GISTO, OKT-2004.
Vaske, G.Otto.
Str. Esperanto,880
95760-000 Kaiurbo-RS
ottovaske@ibest.com.br
(Per ttt-sendebla skribo.)

e-ADRESO

BV noti por vi mian novan adreson: ottovaske@ibest.com.br

BKE-PREPARA KUNSIDO

Okazis la 16an/10, en GEA, plia preparkunsido por la 40ª Br.Kongreso de Esperanto, 2005. Arigxis pli ol dek aktivaj movadanoj sed, domagxe, ne cheestis kelkaj tre aktivaj gesamideanoj, inkluzive de Julinja, la prezidantino de la Kongreso.La preparlaboroj marsxas. Kelkaj interkonsentoj kaj fonto el kiu cherpi la necesan monon ankorau mankas.Chiu sentu sin invitata raspi iom el sia kaso, por helpi briligi la Kongreson praparatan de la aúcha E-movado, subtenata de BEL. Eblas ke la kongresejo estos proponata de ULBRA, en la urbo Kanoas (Canoas). Gxi situas chirkau 12 Km for de POA. Lertulo pretigas pagxon por diskonigo de la grava evento tr ala gaucha e-reto. Oni spektis la preparatan projekton. Gxi havos,krom simbolon, kolorojn de la gaucha standardo. Malgrau la malcheesto de influhavaj samideanoj, la edifa agado inspiris optimismon. Ni ne lasu ke nur pokaj elstaruloj submetu sin al la tuta peza laboro farenda.! – Gxis la momento kiam mi devis foriri oni ne estis decidinta la daton de la venona tiucela kunsido. Chiu restu atenta.

VIRINOJ KOMPAREBLAS AL KOMPUTILO.

1 – Tuj post kiam vi akiras unu, prezentigxas aliaj pli bonaj en pluraj kvartaloj;
2 – Neniu krom la Kreinto sukcesas kompreni ilian internajxon;
3 – Ili konservas chion en la memoro, ech etetajn erarojn kiujn vi iam faris.
4 – La specifa lingvo kiun ili uzas inter si estas nekomprenebla al aliuspeca ulo;
5 – Ne gravas kiun ajn vi elektas, el iu ajn modelo, tuj poste vi elspezos ankorau pli, por akcesorajxoj kaj riparadoj;
6 – Gxenerale la akiro ne multe kostas sed la vere bonaj ege elspezigas;
7 – Ili rapidege procesas informojn sed ne pensas;
8 – Tiuj de najbaro au de laborejo chiam estas pli bonaj ol tiu kiun vi posedas hejme;
9 – Ili neatendite paneas, kiam vi preparas la plej gxuindan taskon.

Oni atendas reagojn el la virina trancheo.

PREGXO

Karaj gelegantoj, BV helpi min ne perdi la fidon. Ekde la infaneco mi audas: "Petu kun fido kaj vi ricevos"... "Fido kapablas formovi montojn". Sed, chu vere? - Vi ne permesu ke mia pensado kauzu al vi devojigon el la gxusta irvojo. Nur akompanu mian pensofluon. Ni konsideru la petojn enhavatajn de La Patronia.

1...Venu al ni via regno –2 La chiutagan panon donu al ni hodiau –3 Ne lasu nin fali en tenton sed liberigu nin de la malbono.

Konsideroj rilate al 1: chiutage unu miliardo da homoj pregxas, ke Dio venu regi la mondon sen kontraustaro. – 2: minimume tri miliardoj da homoj petas al Dio, ke Li nuligu la malsaton de chiuj popoloj – 3: ses miliardoj da homoj fervore petegas la pacon por la mondo, inkluzive mi mem. Nu, eblas ke mi ne sufiche fervore pregxas kaj tial absolute ne meritas Lian atenton sed... chu ekzistas minimuma eblo, ke neniu el la tuta homaro estas inda je la dia boneco, por meriti la plenumon de karitata peto favora ne al ununura homo sed jes al la suferanta homaro? – Por mi restas solida la penso: Dio estas chiopova, bona, justa kaj chioscia, tial li prizorgas chiun lau sia merito. Lau tio nur restas al ni plenkore danki al Li por la bono kaj malbono kiuj trafas nin, sen peti ion.

TESTO – Diru la diferencon inter BOMBI/BOMBARDI – GXUSTA/JUSTA kaj PROVO/PRUVO. – Chu la verbo TEDI estas transitiva au ne? – Kiu estas la diferenco inter PROPONI/OFERI/OFERTI ? /////// Ne laute respondu. Kribu !

PROPRAJ NOMOJ

Landoj kun forta E-movado adoptas skribi, per E-literoj, proprajn nomojn kiel ili estas plej konataj tra la mondo, sen akuzativo, kiam estus necese. Sufichas ke oni aldonu kvalifikan vorton, se ne estas tiitolo/ordeno menciebla. Tio plachas al legantoj kaj al la homoj menciataj. Prenu ekzemple la nomon "Bush", kiu farigxas "busxo"; La nomo de la nuna rusa prezidento farigxas "putino" se oni obstine ne allasas flekseblecon. Tiel la esperantistaro farigxus abomeninda popolo. Tion ni nepre evitu.

ADAMO ANTAU LA KREINTO.

Chiu besto havas sian paron, bovo-bovinon, hundo-hundinon, ech birdoj rajtas parigxi. Mi volas havi kunulinon.
Dio: kion vi volas ke mi kreu por vi?

- Mi volas hominon, por fini mian solecon. La Chiopova gratis sian mentonon kaj diris:

Nu bone, sed por tio mi devas depreni kaj uzi unu vian kruron.

- Unu kruron?!...sed, Sinjoro, kiel mi povos vivi kun nur unu kruro?
- Do mi uzos unu el viaj brakoj.
- Unu brakon? Ne, tute ne, kiel mi povos vivteni min per nur unu brako?
- Sed ne restas alia solvo. Mi bezonas alian korpoparton, por fari virinon.

Sxokita pro la nura solvo oferi parton el sia korpo, Adamo riskis: - Chu vi povos depreni parton kiun mi ne multe uzas, kiel ripon, ekzemple?
Dio denove gratis sian mentonon, iom pensis kaj decidis: Nu bone, eblas sed mi avertas vin ... estigxos bela fusxajxo.

RADIO

En altaj radiofrekvencoj la ondodisvastigxo, en nia suda hemisfero, nuntempe malplibonigxis chefe en sunoplenaj tagoj. Tion mi rimarkas jam de du monatoj malgrau ke mi havas bonegan ricevilon radioamatoran, kun specifa anteno por sep megahercoj. 7150 Khcj, je la oka matene lastatempe estis la plej komforta audebla; 9510 Khc chiam suferas QRM=intermikso far flankaj stacioj. 11.925 delonge ne audeblis. Domagxo! Sed, ni restadu atentaj, por profiti favorajn tagojn. Kiu ne senprobleme kaj flufacile trovas la gxustajn vortojn, kiam li/sxi parolas, tiu ege sxuldas auskulti CHO-RO-I. Klopodu, ne perdu sxancon perfektigxi iel ajn gxuste nun antau la BKE en Porto Alegre-RS.